

Annette von Droste-Hülshoff,
 Lastaj vortoj
tradukita de Joseph Ferdinand Berger

Amatoj, kiam min forlasis
 spirit', ne ploru do pro mi!
 Por paca ekzistad' min kaŝis
 en brila tag' la bona Di'.

Ne estas plu ĉagreno tera.
 Eternas via bild' ĉe mi.
 Mi petos pri balzamo vera
 por vundoj kaj dolor' de vi.

Se svingas Pac' en nokta ombro
 Seraffugilojn super Ter',
 ne pensu plu pri mia tombo!
 Salutas mi el stela sfer'.

...

Annette von Droste-Hülshoff,
 Lastaj vortoj (0)
tradukita de Manfred Retzlaff

Laŭvorta Esperantigo

Amatoj, kiam forpasis mia spirito,
 ne postploru min per iu larmo;
 ĉar tie, kie mi restadas, tie estas paco,
 tie lumas al mi eterna tago.

Tie, kie ĉiu ter-aflikto estas malaperinta,
 ne foriĝu via bildo al mi,
 kaj mildigon por viaj vundoj,
 por via doloro volas mi elpetegi.

Se dum la nokto blove svingas siajn seraf-flugilojn
 la paco super la mondo-regnon,
 ne pensu tiam plu pri mia tombo,
 ĉar el la stela spaco mi salutas vin.

...

Annette von Droste-Hülshoff,
 Lastaj vortoj (1)
tradukita de Manfred Ratislavo

1a traduk-versio

Karuloj, kiam pasis mia
 Spirit', pri mi ne ploru vi;
 Ĉar lumas jen en paco Dia
 Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro
 Memoru daŭre mi pri vi,
 Por viaj vundoj kaj doloro
 Mildigon volas peti mi.

Se nokte per flugilo sia
 Pac' tuŝas tiun mondon ĉi,
 Ne pensu plu pri tombo mia,
 Vin de l' stelar' salutas mi.²

...

²aŭ: Ĉar de l' stelar' salutas mi.

*Traduko de la Germana poemo “Letzte Worte” de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de JOSEPH FERDINAND BERGER (*1894-10-07 – †1976-03-28) en 1958.*

Arg-160-467 (2009-11-22 09:37:58)

Tiu ĉi traduko de la poemo estas unue publikigita en 1958, ĝi aperis en la Esperanto-revuo “Norda Prismo”, n-ro 58/2, sur paĝo 74. Vidu ankaŭ la ttt-ejon “<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/np/np5802/lastaj.html>” de s-ro Donald Harlow el Pinole CA-94564, Kalifornio. Malgraŭ la supra indiko la poemo ne estas verkita de la poetino mem, sed - laŭ pli nova scienca ekkono - de ŝia nevino Elisabeth, post la morto de Annette von Droste-Hülshoff. Oni ĝis nun nur atribuis la poemon al Annette von Droste-Hülshoff.

Pri Joseph Ferdinand Berger rigardu ankaŭ la retejon http://wapedia.mobi/eo/Joseph_Ferdinand_Berger#2.

*Traduko de la Germana poemo “Letzte Worte” de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2004-05-16.*

Arg-160-475 (2004-05-16 17:17:06)

Proksimuma laŭvorta Esperantigo de la origina germana-lingva teksto

*Traduko de la Germana poemo “Letzte Worte” de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-05.15.*

Arg-160-316 (2004-05-16 13:55:41)

La origina versio de tiu ĉi poemo estas laŭ informo de l' 06.02.2003 fare de d-rino Ed-da Baußmann de la societo “Annette von Droste-Hülshoff” (Am Haus Rüschaus 81, D-48161 Münster/Westfalen, Germanio, bausmann@droste-gesellschaft.de, www.droste-gesellschaft.de) ne verkita de la poetino mem sed de ŝia nevino Elisabeth, post ŝia morto.